nia voĉo

madrida esperanto-liceo novembro 2014

## OKTOBRO PLENIS JE VIZITOJ

La pasinta monato oktobro plenis je interesaj vizitoj de esperantistoj el aliaj partoj de Hispanio kaj el aliaj landoj, kelkaj jam anoncitaj, aliaj tute neatenditaj.

Nicola Ruggiero, italidevena poeto nun loĝanta en Rejkjaviko, pasigis kelkajn tagojn en Madrido, kaj prelegis la 3-an de oktobro en la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio pri la verko "La poemo de Utnoa", de Abel Montagut. La prelego estas tute spektebla en http://www.youtube.com/watch?v=BBQbfomyODA.

Phuong Nguyen (*Flama Floro*), juna esperantistino el Vjetnamo, restis en Madrido unu semajnon survoje al Murcio, kie ŝi studos dum tiu ĉi jaro. Kelkaj esperantistoj ĉiĉeronis ŝin ĉirkaŭ la urbon.

Ankaŭ alvenis Youngung Kim (esperante *Heroo*, hispane *Esteban*), el Koreio, kiu studos en Madrido dum tiu ĉi akademia jaro. Li jam komencis partopreni en nia madrida esperantista vivo, en la klubo kaj ekster ĝi.

Kiel anoncite, ankaŭ restis iom da tempo en Madrido la brazilano Rafael Henrique Zerbetto, survoje el Poznano. La 18an de oktobro ni montris la klubon kaj la urbon al Christian Castillon, el suda Francio, kiu venis madriden por kunveno rilate al kongreso pri la Williams-sindromo, en kies asocioj li aktivas.

Susanna Baghdasaryan, el Armenio, pasigis pli ol unu semajnon en Madrido, kie ŝi gastis ĉe esperantisto.

Riĉardo Delamore, el Aŭstralio, ankaŭ venis al Madrido fine de oktobro. Bedaŭrinde, en tiu ĉi kazo, pro diversaj prokrastoj kaj malhelpoj, li finfine ne povis rendevui kun ni.

Pluraj amikoj el aliaj urboj de Hispanio vizitis Madridon dum oktobro. Inter ili: Nadia Terán, el Sevilo, kiu partoprenis la turisman viziton, Enric Baltasar, el Oliva, kiu renkontiĝis kun diversaj amikoj, Faustino Castaño, el Asturio, kiu vizitis la klubejon la 27-an de oktobro. Fine, ankaŭ Miguel Gutiérrez Adúriz kaj Pedro Ullate, el Santandero, Raúl Martínez Anguita kaj Julie, el Reĝurbo, kaj Olivjero el Italio, partoprenis la Bohemian Nokton.



*Bohemia nokto, Madrido, 4-a de oktobro 2014.*

*Sekvinte la spurojn de Maks Stelo, la ĉefrolulo de "Bohemiaj lumoj", de Valle-Inclán, sub la gvido de Miguel Fernández, ni haltis por fotiĝi kun alia teatra heroo, Federico García Lorca.*

## PRELEGO EN KLUBO

La lundon 17an de novembro Carmen kaj Lupe prelegos pri Irano, kun diapozitivoj el sia freŝa tiea vojaĝo. Je la 19,00 horo, en la sidejo de MEL.

## VENONTAJ PRELEGOJ KAJ DEKLAMADOJ

Manolo Pancorbo prelegos la 5-an de novembro, dum la Semajno de la Scienco en kvartalo Usera, en kies organizado kunlaboras niaj samklubanoj Mati kaj Félix. Li parolos (hispan-lingve) pri komunikado kun eksterteraj inteligentoj, pri kio li jam prelegis esperante en pasinta Zamenhofa Tago. La loko estos la preĝejo San Juan de Ávila, en la str. Fornillos, je la 19,30. Vidu la tutan programon en: http://semanacienciausera2014.wordpress.com/

Miguel Fernández partoprenos en la "Liberecanaj Tagoj pri Arto kaj Kreivo" de kvartalo Karabanĉelo (*Jornadas Libertarias de Arte y Creatividad de Carabanchel*), kiuj disvolviĝos dum la semajnfino de la 7a, 8a kaj 9a de novembro en EKO, okupata konstruaĵo en tiu madrida kvartalo, strato Ánade, 10, metrostacio Oporto. La sabaton, 8-an de novembro, je 20,00 h., estas programita poezia recitalo,dum kiu Miguel deklamos, hispane kaj esperante, diversajn revoluciajn poemojn.

## EN NACIA BIBLIOTEKO

De tempo al tempo laboro alportas malgrandajn plezurojn. Kiel informis Ana Manero, antaŭ kelkaj tagoj ŝi havis la ŝancon malkovri juveleton en la Nacia Biblioteko de Hispanio. Temas pri la verko "Sesdek ŝakproblemoj", de José Paluzíe y Lucena, kiu estis perdita en la katalogo ĉar, siatempe, kiam oni katalogis ĝin, oni taksis la lingvon "nekonata" kaj la verko ne troveblis kiam oni faris ĝeneralan serĉon per "Esperanto". Ŝi rekatalogis la verkon por ke ĝi estu bonorde trovebla. Temas pri la unua libro pri ŝako verkita en Esperanto kaj ĝi estis donacita de la aŭtoro al la Nacia Biblioteko. La aŭtoro estas la patro de alia Paluzíe konata de hispanaj esperantistoj: la aŭtoro de la poŝvortaro "Lexicón-Sopena".

## ĈAMPIONECO PRI MEMORO

En oktobro disvolviĝis en Madrido la unua Ĉampioneco pri Memoro de Hispanio. Ĝi fariĝos historia ankaŭ ĉar temas pri la unua kazo en kiu eblis partopreni en Esperanto en la tradukeblaj partoj. Tie partoprenis nia amiko Marco García Baturán.

## ALIĜO AL MEL

La dokumento por aliĝi al Madrida Esperanto-Liceo, estas jam elŝutebla el la retejo de MEL, en la adreso http://www.esperanto.es/pli/images/MEL/MELinscripcion.doc.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30.

La 1-an de novembro la babilrondo de la unuaj sabatoj okazas en nova drinkejo, Sidrería El Tigre, strato Infantas, 30, proksime de stacidomoj Banco de España, Chueca kaj Gran Vía.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/, kaj la Fejsbukan forumon https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com